

la verda stelo



**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

septembro 2008



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO
GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. +3150 525 00 86
retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouter
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouter@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo
Harm Roeters
retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

- 3 ... Klubkunvenoj, naskiĝtagoj
- 4 ... Pri la nordo
- 8 ... UK-impresoj – Johan Swenker
- 10 ... Roterdamo – Luit Staghouter
- 13 ... Anstataŭ fumsignaloj
- 14 ... La kastanoto

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2008

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op Postbanknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00

Klubkunvenoj

oktobro

- 2 malferma vespero
- 16 prelegos *Harm ROETERS*
- 30 ekzamenekzercoj

novembro

- 13 gastpreleganto *Ginta LIATUKAITE*
- 27 librorecenzoj

decembro

- 11 festvespero

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia
retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>



septembro

- 3 W. Akkerman
- 7 M.F.W. Kruijswijk
- 17 H.W.T. van Hogen-Cornelissen
- 24 A.E. Van der Heij-Alblas
- 26 G.M. Van Reenen
- 30 A.H. Thomas-Nitzsche

oktobro

- 2 R.M. Koopmans
- 3 D. van der Heijden
- 15 Ch.T. Behr-Kunst
- 29 A.M.H. Dodebier
- 30 P. van der Vlis

novembro

- 10 E.L. van der Roest

decembro

- 15 H. Molthoop
- 21 H. Leeuwerke-Kiers
- 30 R.J. Hettinga
- 31 A. van der Heij

Naskiĝtagoj

Pri la nordo

3 aprilo 2008

ĈEESTIS NUR malmultaj homoj. Luit estis en la mal-sanulejo. Ni jam revidis lin, kaj li fartas bone. Retmesaĝe li informis nin, ke lia protektanto Joseph estas ankoraŭ en pola malliberejo.

Ineke tiom okupiĝas pri la Universala Kongreso, ke ŝi ne havis energion veni al la klubkunveno.

En Herzberg – *la Esperanto-urbo* – estas la Interkultura Centro Herzberg. Tie kelkfoje estas Esperanto-kurso.

Koos intencas tien iri.

Kiel programo ni pritraktis la signifojn de proverboj. Iam estis elektitaj por iu kurso kvindek proverboj el la Esperanta Proverbaro de Zamenhof. Tiuj proverboj nun estas enigmoj por ni. Sed kiam oni uzas proverbojn? Fakte nur en la tago de Sankta Neniamo. (Johan)

17 aprilo 2008

PRELEGUS s-ro *Mramba SIMBA* el Tanzanio, sed ĉar li ne ĝustatempe ricevis vizon, li ne povis veni. Ankaŭ kelkaj esperantistoj, kiuj intencis veni por renkonti ĝuste lin, ne venis. Tamen ni ĉeestis ankoraŭ okope. Johan voĉlegis korespond-peton de instruisto el Tanzanio. Ni transdonos la peton al Harm, eble li pretos kontakti tiun sinjoron.

S-ro *Bakker* petis de Koos informojn pri kopiado de fotoj per komputilo *Makintoŝa*. Montriĝis, ke la muso, kiu apartenas al tia komputilo havas nur unu butonon. Tial Koos ne povis konsili lin.

Johan mendis budon por propagandi Es-

peranton en la 5-a de majo, kaj oni jam petis lin prizorgi Esperanto-budon en la KEI-semajno en aŭgusto (por unuajaraj studentoj).

Korespondamiko de Luit el Belorusio proponis gajni por li monon per bredado de kaproj. Luit informis nin ankaŭ pri Joseph, kiu ankoraŭ ne estas libera.

Knabo el Emmen telefone kontaktis Ineke. Li petis de ŝi helpi lin fari reklamon por Esperanto ĉe la EU, kvankam li mem ne estas esperantisto.

Aliulo petis traduki libreton kun iom strangaj filozofiaj frazoj titolitan *Vivu La Revulo*. Estus pli bone laŭ ni, ke Esperanton lernu la aŭtoro mem!

Koos raportis pri la studosemajnfino en Herzberg, kiun li partoprenis. Tie li renkontis esperantistojn el Germanio, Koreio kaj Kolombio.

Poste ni ludis paroligan ludon diversmaniere kaj serĉis la diferencojn inter du desegnaĵoj, kiuj estis nur ŝajne identaj.

5 majo 2008



REMEMORE AL la liberigo de nia lando en 1945 oni organizis la 5-an de majo feston en la Urba Parko. Ni havis budon sur la festotero por fari reklamon pri Esperanto. La tutan posttagmezon deĵo-

ris Johan – kvankam iom malsana – kaj Luit, dum Ineke kaj Wil ĉeestis alterne. La vetero estis agrabla kaj multaj homoj preterpasis nian budon. De malproksime oni povis vidi kaj la Esperanto-flagon kaj la sloganbendon kun la vorto Esperanto. Sur la supra parto de la sloganbendo staras la vorton 'leert', sed ni ĉiam pendigas ĝin tiel, ke videblas nur la vorto Esperanto. Sufiĉaj homoj venis al la budo por paroli kun ni. Eĉ je la sesa, kiam ni volis enpaki la librojn kaj faldfoliojn, ni parolis kun du grupetoj da homoj. Estis do iom pli da serioza interesiĝo pri Esperanto ol en aliaj jaroj!

Ni havis budon ankaŭ en aŭgusto dum la inaŭguro de la studontoj en la urbo Groningen. Bedaŭrinde la vetero estis tiam malbona: daŭre pluvetis kaj foje eĉ pluvis. Tial ni kovris la librojn kaj faldfoliojn per plasta tavolo. Plej grave estis, ke la studontoj preferis resti en la lito ol malsekiĝi en la pluvo. Do ne multaj homoj vidis nin, kvankam la organizantoj aranĝis interesan programon.

Ĉu multaj homoj eklernos Esperanton pro niaj ĉeestoj? Verŝajne ne, sed ili almenaŭ ne rajtas diri plu: *Esperanto, bestaat dat nog steeds?* (Esperanto, ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas? red.)

4 septembro 2008

NI ĈEESTIS sesope el kiuj regalis nin eĉ du!


Kvankam la someraj monatoj ĉiam estas tre kvietaj rilate la klubaktivaĵojn, ni ĉi-somere renkontis unu la aliajn kelkfoje. La 29-an de majo ni sepope ĉeestis en la picejo, kiun ĉiujare ni kune vizitas unufoje. Mankis Ineke, kiun la posedanto ĉiam entuziasme bonvenigas, ĉar li konas ŝin de la tempo kiam li ekloĝis en Groningen. Tie ni ankaŭ enmanigis atestilon al s-ino

Bets Dodebier kiel dankon kaj aprezon pro la multjara prizorgado de niakluba Gratulservo.

La 3-an de julio ni sesope kafumis sur la teraso de V&D. Nuntempe ne plu estas tiom da kolomboj en la centro de la urbo, ili ĉi-foje do ne forŝtelis la torton de sur niaj teleretoj.

La 7-an de aŭgusto ni povis okope sidi en la ĝardeno de *Schimmelpenninckhuis* en Oosterstraat, ĉar la vetero estis sufiĉe bona. La temo de nia konversacio tiam kompreneble estis niaj spertoj dum la UK 2008 en Roterdamo.

Inter la 19-a kaj 26-a de julio ĉi-jare okazis la Universala Kongreso en Roterdamo.



Roterdamo

Partoprenis de nia klubo *Noord-Nederland* 15 membroj, inter ili du nur unu tagon. Kelkaj el ni ofte deĵoris en la kongresejo ĉe la libroservo, akceptostablo aŭ en salono kiel gardistoj. Estis agrable renkonti de tempo al tempo samklubanojn, kaj kelkfoje ni spontanee iris ien kune manĝi. Kvankam la konstruaĵo ne taŭgis por tia kongreso kaj la organizado ne ĉiam iris glate, tamen restis ĉe ni la sento, ke ni travivis agrablan, interesan semajnon. Kelkaj el ni jam pensas pri vojaĝo venontjara al Bjalistoko! (Wil)

Legu poste ankaŭ la impresojn de Johan.



parto de la kongresa grupo

Ĉe Wil anoncis sin du novaj kursanoj, kiuj jam antaŭ tri jaroj dum iom da tempo okupis sin pri la kurso.

Harm iris kelkfoje kun siaj filoj al kinejo. Ili vizitis kun kelkaj parencoj en Alphen-ĉe-la Rejno *Arĥeon*. Post la Universala Kongreso en Roterdamo li veturis al Hungario kaj partoprenis *Internacian Junularan Kongreson*. Ankaŭ tie la fajrobrigado partoprenis, sed ĝia tasko estis pli amuza ol tiu de la kolegoj en Roterdamo.



fajrobrigado Szombathely, IJK 2008

Okaze de sia 35-jara geedziĝo Luit kaj lia edzino Monica ĝuis antaŭ nelonge mallongajn feriojn en Zeddam. Ĉiutage ili promenis en la bela ĉirkaŭaĵo kaj ĝuis la restadon en bona hotelo. Tutan alian opinion Luit havas pri la restado en la roterdama hotelo dum la 93-a UK.

Ankaŭ Wiebren partoprenis la UK. Ĝenerale li estas kontenta pri ĝi, kvankam estis kelkaj 'makuloj'. Sed li spertis plurajn internaciajn kontaktojn. Li okupiĝis pri la vizito de la urbestro de pola ĝemela urbo al sia komunumo. Li veturis al Pollando partopreni la festan preĝejan ceremonion de la filino de polaj geamikoj, kaj poste li veturis al regiono norde de Berlino, kie la flava kolzo bele ornamis la pejzaĝon.

Ankaŭ Nelly partoprenis kaj ĝuis la kongreson. La antaŭlastan tagon de la ekspozicio en Assen ŝi admiris la antikvajn terakotajn statuojn el Ĉinio. Estis ne nur tiaj statuoj de soldatoj kaj ĉevaloj, sed ankaŭ de porkoj kaj ŝafoj. La ekspozicion ŝi tre ŝatis.



terakotaj militistoj

Dum la ferioj post la UK Johan precipe 'ludis per ligno'. La tero en la Hoornse-park, kie loĝas Hanneke kaj Johan, konsistas el torfmarĉo. Ilia loĝejo estas solide konstruita sur fosto, sed la tero ĉirkaŭ la domo iom post iom malleviĝis. Por ke ili tamen sen problemoj povu eniri la domon Johan interalie konstruis peronon antaŭ la dompordo kaj deklivan alirejon antaŭ alia pordo.

Wil veturis post la UK al Slovakio, kie ŝi partoprenis agrablan, kristanan kongreson, kiun partoprenis en familia etoso

prosimume 45 personoj. Ŝi vizitis interalie la Tatra-montaron kaj interesajn grotojn. Pro fajro en iu vagono la trajnveturado hejmen ne estis plezuro. La vojaĝoskemo tute malordiĝis kaj kun kvinhora malfruiĝo ŝi finfine alvenis en Groningen. Unu semajnon poste ŝi trajnveturis al Poznan, kie loĝas amikino, kiu bonege parolas Esperanton. Ĉar la trajnveturado iris pli glate ol atendite ŝi alvenis en Berlino tro frue kaj devis atendi plurajn horojn antaŭ ol ŝi povis daŭrigi la vojaĝon al Poznan. Poste ŝi feris dum dek tagoj en la sudo de Pollando, kie loĝas kelkaj el ŝiaj geamikoj. Ili faris ekskurson al du ruinoj

de kasteloj kaj ankaŭ vizitis dekdu kilometrojn longan baraĵlagon, kiu servas por produkti elektron. Kvankam Wil ĉiam opiniis 'tion mi neniam faros', tiun fojon ŝi tamen veturis hejmen aŭtobuse. Dumvoje ŝi devis busoŝanĝi kelkfoje, sed ŝi venis al la stacidomo en Groningen sen problemoj. Wil jam plurfoje vizitis Pollandon kaj konstatis, ke poloj multe pli bone fartas nuntempe ol antaŭ dekoj da jaroj. Ekzemple la vojoj estas multe pli bonaj. Ŝi montris belegan faldfolion pri Szczawnica, la suda provinco de Pollando. Dumferie ŝi multe parolis Esperanton. (Luit)



EĈ BEBOJ TROMPAS KAJ MENSOGAS

Infanoj mensogas pli frue ol oni supozis. Ne ekde la aĝo de kvar jaroj sed jam de ses monatoj ili trompas plenkreskulojn.

Laŭ esploro en la universitato de *Portsmouth* beboj lernas, ke ili povas ricevi kion ili deziras, ŝajnigante, ke ili ridas aŭ ploras. Tion raportis britaj komunikiloj.

Gepatroj povas facile eltrovi ĉu beboj mistifikas aŭ ne. Falsajn esplorojn ili momenton interrompas post la unuaj singultoj por certiĝi, ĉu ili sukcesis altiri la atenton.

Atento

En la aĝo de ok monatoj beboj klopodas deturni la atenton, kiam ili konscie faras ion malaprobendan. Proksime de la dujara aĝo ili lernas blufi, ŝajnigante fajfi pri minacanta puno.

En la universitato oni esploris kvindek da infanoj kaj intervjuis la gepatrojn.

Fonto: *nu.nl*

UK-impresoj



Ĉi-jare la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Nederlando. Do multaj nederlandanoj aliĝis, kaj ĉeestis ankaŭ multaj mem-

broj de nia klubo, kompreneble. Kelkaj ĉeestis dum nur unu aŭ du tagoj, la plimulto dum la tuta semajno. Unu membro restis eĉ kelkajn tagojn pli, ĉar ŝi ja kunorganizis. Ĉiuj, kiuj regule kunvenas en la klubo, estis en Roterdamo.

Kongresajn ekskursojn mi ne mendis, sed hazarde tamen ekskursis al Zaanse Schans, Volendam kaj Amsterdam. Nur



lastmomente iu rimarkis, ke pli ol cent homoj anoncis sin al tiu ekskurso, dum oni mendis nur unu aŭtobuson kun ĉiĉerono. Dua aŭtobuso estis mendebla, kaj oni petis min gvidi en tiu dua aŭtobuso.

Je *Zaanse Schans* mi tradukis en la fromaĝofarejo kaj ĉe la farado de lignaj ŝuoj. Mi ankaŭ montris al sviso nederlandan polderon. Zaanse Schans estas apud la rivero *Zaan*, parte konstruita sur digo, parte en poldero.



Zaanse Schans

Mi do povis montri, ke unuflanke de la digo la akvo estas alta kaj aliflanke la ternivelo estas malpli alta. Tio estas tre stranga al homoj, kiuj konas nur montojn.

En Amsterdamo mi feliĉis. La boato por la rondveturado estis sufiĉe granda por la

tuta grupo de 110 personoj. La Esperanta gvidanto de la alia aŭtobuso estis Arjen-Sjoerd de Vries, konata pro la Esperanto-lerolibro, kiun li verkis kune kun Roel Haveman.

Arjen-Sjoerd estis interpretisto en la boato. Tion li multe pli bone faris ol mi iam kapablos. Ekzemple post longa listo de domaj ecoj li kapablis la liston ne nur reprodukti sed ankaŭ traduki en Esperanton.





Amsterdam

Kiam mi ne estis en la kongresejo, mi mem ekskursis tra Roterdamo. Antaŭ la kongreso mi demandis konaton: kiu parto de la urbo vizitindas? Li konsilis iri per akvotaksio al hotelo New York. La konstruaĵo de la hotelo estas la iama oficejo de *Holland-Amerikalijn*, kiu estas impresa, precipe kiam vi iras tien per boato.



Holland-Amerika Lijn

Mi iris ankaŭ al *Radio Correct*. La butikoj ne estas pli interesa ol similaj butikoj en Groningen. Sed en la supra etaĝo de Radio Correct troviĝas muzeo pri komputiloj. Estis interese revidi *TRS-80-n* post tridek jaroj.

En la kongresejo mi ĉeestis multajn prelegojn, interalie tiuj de *John Wells* pri fonetiko kaj pri Vikipedio, la libera reta enciklopedio. La programero *softvaristo* estis serio da prelegoj pri lingvistiko, Es-

peranto kaj komputiloj. Ekzemple *Victor Sadler* prelegis pri komputila tradukado en Esperanton. Do iomete simila al la iama DLT (*distribuita lingvo-tradukado*).



TRS 80

Preskaŭ ĉiuvespere mi estis en la granda salono sperti la teatraĵojn. Mi ĉiam viciĝis tiel frue, ke mi povis sidi en la ĉefsalono. Homoj, kiuj alvenis akurate laŭ la programo, plejofte povis spekti nur televidekranojn aliloke. En la ĉefsalono estis lokoj por nur duono de la aliĝintoj.



lignaj ŝuoj

La aliaj membroj de nia klubo verŝajne spertis tute alian kongreson, babilante en la granda halo aŭ ekskursante ĉiutage. De du personoj mi jam aŭdis, ke ili jam anoncis sin al la UK 2009 en Bjalistoko, Pollando. Ili do havis agrablan tempon, same kiel mi.

Johan Swenker

Roterdamo

LA KONGRESA URBO

Plurfoje mi vizitis la hejmon de UEA kiam okazis malferma tago. Preskaŭ ĉiam mi vizitis ankaŭ la ĉirkaŭaĵon de la Malnova Haveno, kiu situas je la iama enfluejo de rivero Rotte. Tie troviĝas ne nur la famaj kubaj domoj, sed ankaŭ Blaaktoren, metrostacio, la Centra Biblioteko, la Blanka Domo kaj kompreneble la haveno kun la multaj malnovaj ŝipoj kaj la ŝipriparejo.

La konstruaĵoj havas plurajn kromnomojn. Blaaktoren nomiĝas ankaŭ Koboldo Pintoĉapo aŭ Kraĵono. La najbara metrostacio NIFO (Ne Identigita Fluganta Objekto), Fajfilhava bolkruĉo, Pedalrubujo aŭ Putkovrilo, kaj la Centra Biblioteko Tubobebo, Gasfabriko, Glacitorto aŭ Polvosuĉilo.

Kubaj domoj

MI KONSULTIS Vikipedion por ekhavi kelkajn informojn pri la kubaj domoj: Kuba domo estas domo en la formo de



renversita kubo sur kolono, alinome Kolondomo aŭ Arbodomo. En la sepdekaj jaroj la nederlanda arkitekto *Piet Blom*

konstruis kubajn domojn en Helmond kaj Roterdamo. Li opiniis, ke, se oni konstruas domojn sur kolonoj la spaco sub la domo povas esti publika. Tiu ideo li 'prunteprenis' de *Le Corbusier*, fama svis-franca arkitekto (kiu naskiĝis en La-Chaud-de-Fonds la 6-an de oktobro 1887)



kubaj domoj

En la kuba domo de Piet Blom estas tri etaĝoj, sube (en la 'stratdomo') estas kuirrejo kaj loĝejo, en la meza parto (la 'ĉieldomo') estas la dormĉambroj kaj eventuale studejo, kaj en la 'foliarkabano' (la supra parto) estas la triflanka piramido, en kiu povas esti malgranda varmejo, balkono aŭ ĝardeneto. En la sesflanka kolono sur kiu la domo estas konstruita, estas la enirejo kaj la ŝtuparejo.

La blanka domo

VIKIPEDIO DIRAS jenon pri tiu interesa 'alta' domo: 'la Blanka Domo estas konstruaĵo en Roterdamo, kiu iam estis la

plej alta oficeja konstruaĵo en Eŭropo. Ĝi estis la unua nubskrapulo de Roterdamo kaj postvivis la bombardadon dum la dua mondomilito en 1940. Poste oni iom modifis ĝin, sed dum la naŭdekaj jaroj remetis laŭeble la originan formon, precipe pri gabloj kaj tegmento.'



Blanka Domo

Ĉu alta konstruaĵo? La kontrasto inter la iama 'nubskrapulo' kaj la nuntempaj ordinaj altaj konstruaĵoj estas granda. La 11-etaĝa Blanka Domo estas konstruita en 1898 kaj estas 45 metrojn alta.

La Cigno

LA OFICIALA NOMO de tiu nova ponto (1996) estas *Erasmusbrug*. Ĝi estas 808 metrojn longa, kaj la pilono, al kiu estas ligita la 32 stajoj, estas 139 metrojn alta. Al la stajoj pendas 284 metrojn longa



Ponto Erasmus

pontoparto. Je la suda flanko troviĝas 'baskula' ponto, kiu estas 89 metrojn longa kaj la plej longa (kaj peza) baskula ponto en Okcidenta Eŭropo.

Zamenhofstrato

ANKAŬ EN ROTERDAMO estas Zamenhof-strato, kaj 'kompreneble' mi iris tien por ekscii kiel aspektas tiu strato. Nu, estas ordinara strato en malnova kvartalo. En la strato estas malaltaj domoj, malnovaj kaj novaj. Mi trairis la straton kaj fotis kelkajn stratnomtabulojn.



Stranga heliko

DUM LA UK mi partoprenis interalie ekskurson al *Biesbosch*. Ni ne nur ŝipveturis, sed ankaŭ estis iom da tempo fari mallongan promenon, dum kiu mi vidis strangan helikon. Sur ties kapo mi ne vidis la kutimajn maldikajn antenojn, sed du dikajn rondajn kaj buntajn ŝvelaĵojn, en kiuj kvazaŭ moviĝis kaj turniĝis kelkaj ringoj. Neniam antaŭe mi vidis tian helikon. Mi faris kelkajn, bedaŭrinde malbonkvalitajn fotojn, sed ili tamen pruvas, ke mi ne eraras. Intertempe mi scias, ke la heliko estas *succena heliko* (succinea putris, barnsteenslak) kaj, ke iu parazita vermo nestiĝis en ĝi. Post iom da tempo tia parazita

vermo ekhavas klaboformajn elstarajojn, kiuj parte alvenas en la tentaklojn de la heliko. Tiuj elstarajoj moviĝas pulsante por kapti la atenton de birdoj. Se birdo manĝas la helikon, la vermo plenkreskas en la birdo. Sed se la pulsantaj elstarajoj de la parazita vermo ne sukcesas altiri la atenton de birdo, ili fine krevigas la helikajn tentaklojn, kaj centoj da larvoj de la parazita vermo el la heliko rampas serĉi novajn viktimojn. La naturo estas interesa sed kelkfoje tre kruela fenomeno.



succena heliko

Luit Staghouver



MORTIS LA POETO MAHMUD DARWISH

Amasoj da Palestinoj faris lastan omaĝon al la poeto *Mahmud Darwish* en la cisjordanio urbo Ramallah. Eminentaj funebrantoj, kaj eĉ la palestina gvidanto Mahmud Abbas priskribis la poeton kaj aŭtoron kiel heroon por ĉiuj Palestinoj. Darwish estis unu el la plej influaj kulturaj personoj en lasttempa araba historio, kiu scipovis kapti la esencajn trajtojn de la palestina sopiro al sendependeco.

Li mortis post malfermkora operacio en Usono, la 9-an de aŭgusto je la aĝo de 67 jaroj. Miloĝoj da nigre vestitaj funebrantoj laŭiris la stratojn de Ramallah, multaj tenis portretojn de la poeto kaj palestinajn flagojn. Militista konvojo prenis la ĉerkon, kovritan per palestina flago kaj flavaj floroj, ĝis la tombo de s-ro Darwish apud la Palaco de la kulturo, proksimume 4 km for de la centra parto de Ramallah. *"Li estis majstro de Vorto kaj Saĝeco, li estis simbolo kiu esprimis nian nacian senton, nian homan konstitucion, nian deklaron de sendependeco,"* s-ro Abbas diris. *"Vi restas kun ni, Mahmud, ĉar vi reprezentas ĉion, kio unuigas nin."*

Mahmud Darwish estis konsiderata kiel nacia ikono, kies verko ofte baziĝis sur liaj spertoj de vivo en ekzilo.

"Li simboligas la palestinan memoron," iu palestina funebranto diris al fremdaj reporteroj. *"Li intencis transdoni mesaĝon : fine ni ĉiuj estas homoj kaj ni devas labori kolektive por la homaro."*

Li ankaŭ skribis la faman paroladon, kiun Arafat liveris ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en 1974 : *"Hodiaŭ mi venas kaj kunportas branĉon de olivarbo kaj pafilon de libereco-batalanto. Ne lasu la branĉon de olivarbo fali de mia mano."* Apenaŭ estas dubo, ke lia verkaro, ne nur pri la palestina motivo, sed ankaŭ pri amo kaj espero kaj morto, daŭros trans la araba mondo...

Fonto: eventeo.net



Anstataŭ fumsignaloj

Finfine haveblas: poŝtelefono por surduloj. Kriado ne helpas. Sed ja per gestoj oni povas interkomuniki. Kaj per malfermita buŝo, kuntiritaj brovoj aŭ erotika rigardo oni kapablas montri miron, koleron aŭ enamiĝecon.

Telefono signifas pli-malpli sono de malproksime, paroli je granda distanco.

Multaj homoj pensas, ke tia telefonio estas tre moderna, sed fakte ĝi aĝas kiel la mondo. Ekzemple antaŭ kelkaj jarcentoj turoj troviĝis laŭborde de la franca maro je ĉiu tioma kilometro. Sur ili staris semaforoj, signaliloj kun moveblaj brakoj, per kiuj oni povis signali al pli malproksima turo.

"Jen la kvin mil ŝipoj, pri kiuj vi asertas, ke la britoj tiom ne havas!" oni povis 'diri'. Kaj indianoj uzis fumsignalojn: "Uĥ, uĥ."

Movebla telefonio estas nur logika evoluo. Depost la tempo de semaforo kaj fumsignaloj estas speco de homoj, kiuj tamen malprosperis: surduloj kaj duonsurduloj. Ja per vibrado oni povas percepti, ke iu alvokas, sed kiel ajn laŭte tiu krias en la poŝtelefonon, la surdulo aŭdas nenion. Ĝuste tion ŝanĝos la Vaŝingtona universitato. Nome, esploristoj de tiu

usona universitato faris komputilprogramon por poŝtelefonoj kun malgrandaj ekrano kaj kamerao. Tiel du surduloj kapablas gestlingve interkomuniki.

Tiun lingvon oni ja konas: la sinjorino, kiu dum novaĵelsendo grimacas kaj permane 'desegnas en la aeron', parolas en gestolingvo.

Kompreneble, surduloj jam povis 'telefoni' unu al alia per SMS (Simpla Mesaĝo-Servo). Sed laŭ la unuaj uzantoj de tiaj porsurdulaj bildotelefonoj la eblo vidi unu la alian estas granda paŝo antaŭen kompare kun tekstoj. Ĉar gestolingvo inkluzivas ankaŭ lingvon korpan.

Por montri miron, koleron, plezuron aŭ enamiĝecon nenio taŭgas pli ol malfermita buŝo, kuntiritaj brovoj, dorsenklinakapo aŭ erotika rigardo.

Krom la nova softvaro estas ankoraŭ io alia, kio ebligas pergestan konversacion: la kreskinta bendolarĝo de la telefonreto. Simple dirite: antaŭe ĉiuj bildinformoj kvazaŭ puŝiĝis tra ŝalmo, sed nuntempe ili fluas tra ŝpructubo.

Restas nur unu malkomfortaĵo: gestolingvo ne eblas per unu mano.

Menno Steketee (trad. el NRC Handelsblad)

supre: la knabino sur la poŝtelefona ekrano diras:

Mi (maldekstre) ne volas (mezmaldekstre) en la lernejo (mezdekstre) hodiaŭ (dekstre).



LA KASTANOTO, KIU KANTAS PLEJ KOMPLEKSE, OFTE ESTAS LA PLEJ INTELIGENTA

Ju pli kompleksa la kanto de maskla kastanoto, des pli tiu kapablas solvi problemojn. Tiu 'elokventeco' do ŝajnas indiki inteligentecon.

Tion malkovris *Neeltje Boogert*, kiu doktoriĝis ĉe McGill Universitato en Montrealo, Kanado. La esplorrezulto aperos post ne longe en la interreta versio de revuo *Animal Behaviour*.

Ĉe multaj specioj unu sekso estas pli elektema ol la alia. Plejofte la femaloj estas kritikemaj. Ili plej ŝatas masklojn havantajn 'bonajn genojn' kaj estontajn bonajn patrojn. La femaloj taksas la masklan kvaliton nerekte: ili elektas masklon plej bele kantantan, dancantan aŭ kun la plej bela plumaro. Tiuj ecoj ne estas profitigaj per si mem, sed respegulas la masklan kvaliton.

La biologian rilaton inter tiaj aferoj oni neniam esploris ĝis nun. Biologoj ja scias jam, ke muŝkaptuloj, kiuj kantas pli kompleksan kanton, pli bone statas kaj havas pli bonajn teritoriojn. Najtingaloj havantaj pli grandan repertuaron disponas pli longajn flugilojn, pli multe pezas kaj atingas la kovejojn pli frue.

Sed kiel rilatas kantado kun ĉiuj ĉi favoraj trajtoj? Estas evidente, ke la rilato estas la lernokapablo. Kanto- kaj lernokapablo havas la saman sidejon en la cerbo. Femaloj, kiuj elektas 'elokventan' masklon, fakte elektas bone evoluitan cerbon.

Boogert kaj ŝiaj kolegoj deziris pruvi, ke kantokomplikeco rilatas al lernokapablo. Ili fiksis la komplikecon surbaze de tri mezuroj: la daŭro de kanto, la nombro de kantaj silaboj kaj en unu kanto la nombro de silaboj unikaj.

Poste ili submetis la masklajn kastanotojn al ĉiam pli malfacila furaĝa tasko. La birdoj lernis levi putokovrilon por atingi semujon.

Evidentiĝis, ke la plej bonaj kantistoj lernis plej bone: ju pli da silaboj en ilia kanto, des malpli da klopodoj instrui al si la lertaĵon. Tiu korelativo konsistas nur en la sumo de silaboj.

Suka detalo: ĝuste tio estas al la kastanotinoj plej erotika.

Nienke Beintema (trad. el NRC Handelsblad)



Kastanoto (Taeniopygia guttata)

supre: la maldekstra virkanoto estas bona kantisto kaj elstaris. La meza kantis enuige kaj ne sukcesis kapti la semojn. La dekstra faris averaĝe.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen